

Esperanto por UN

Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 52, majo-junio 2021



Universala Esperanto-Asocio

Rekorda partopreno en simpozio Sperti kaj memori migradon: La traŭmo de lingvo

Per entute 1052 aliĝoj de homoj troviĝantaj en 51 landoj, la ĉi-jara Simpozio pri Lingvo kaj Unuiĝintaj Nacioj superis ĉiujn atendojn. Kun temo “Lingvo kaj Migrado: Sperto kaj Memoro”, la virtuala aranĝo konsistis el sep sesioj distribuitaj tra du semajno, de 19 aprilo al 1 majo. Sesioj traktis temojn kiel ekzemple: Lingvaj Homajn Rajtojn, Interpretadon kaj Tradukadon, Amasmediojn kaj Rezentadon, Azilpetantojn, kaj Migrantojn kaj la Ŝtatojn.

La ĉefa organizanto estis la Laboratorio pri Migrado ĉe la Universitato Princeton. Kunlaborantaj sponsoroj estis i.a. Birkbeck, University of London; the Center for Applied Linguistics (Centro por Aplika Lingvistiko, Vaŝingtono); Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (eldonanto de la revuo *Language Problems and Language Planning*), kaj Esperantic Studies Foundation (ESF).

Sponsoris la aranĝon ankaŭ la nove starigita NRO-Komitato pri Lingvo kaj Lingvoj, en kiu membras Universala Esperanto-Asocio. Rezentanto de UEA ĉe UN Humphrey Tonkin alparolis la malferman sesion de la simpozio, kune kun Esther Schor, profesoro ĉe la Universitato Princeton, kiu estis la ĉeforganizanto de la simpozio.

Laŭ aktualaj kalkuloj de Unuiĝintaj Nacioj pli ol 80 milionoj da homoj estas nun devige dislokitaj el la lokoj kie ili loĝas. Pli ol unu triono konsistas el infanoj. Kaj oni ne antaŭvidas finon al tiu homa katastrofo. Multaj tiuj dislokitoj troviĝas en regionoj kie oni parolas aliajn lingvojn ol tiujn de la dislokitoj, kio kondukas al malfacilaĵoj kun instancoj, edukaj interrompoj kaj streĉiteco kun la loka loĝantaro.

Kiel atentigis la anonco de la simpozio, “Lingvo estas nepra, sed nesufiĉe esplorata, faktoro en la vivo de migrantoj, enmigrantoj kaj rifuĝintoj. Ĝi rekte trafas la spertojn kaj elektojn de individuoj dislokitaj de milito, teroro kaj naturaj katastrofoj, kaj la decidoj farataj de agantoj kiuj liveras (aŭ neglektas liveri) helpon, servojn kaj statuson. Distilita tra la memoro, ĝi muldas la fikciojn, poemojn, memoraĵojn, filmojn, kaj kantoversojn per kiuj migrantoj esprimas perdon kaj dislokiĝon, integriĝon kaj eltrovojn, la tradukadon de historio kaj kulturo, kaj la defiojn de identeco.”

Tamen, kiel pluraj parolantoj atentigis, la libera kaj senbara migrado ludis kaj ludas signifan rolon en proksimigo de la homoj, transportado de kulturoj, riĉigo de belarto, kaj antaŭenigo de internacia kompreniĝo.

Tradicie, la ĉiujara simpozio, okazanta ĉe la Eklezia Centro (Church Center) tuj apud la ĉefsidejo de UN, allogas UN-funkciulojn, diplomatojn kaj reprezentantojn de neregistaraj organizoj. Ĉi-jare, pro tio, ke la simpozio virtualis, la ĉeestantoj konsistis ĉefe el socisciencistoj, projektofunkciuloj kaj politikoformantoj, artistoj kaj verkistoj: la voĉo de UN estis malpli evidenta. La organizantoj jam konsideras la eblecon aranĝi la venontjaran simpozion kiel unutagan fizikan aranĝon en Novorko por engaĝi UN pli rekte, kuplitan al unutaga virtuala aranĝo por altiri tutmondan partoprenon – kaj denove traktante migradon kaj rifuĝintojn.

La aranĝo malfermiĝis per parolado de Sarah Dryden-Peterson, el la Universitato Harvard University, pri lingvo, migrado kaj edukado, kaj finiĝis per legadoj de la verkistoj Jhumpa Lahiri, Yiyun Lee kaj Aleksandar Hemon, plus emociiga kaj potenca parolado de la romanverkisto Viet Thanh Nguyen. Detaloj de la programo ankoraŭ troveblas ĉe <https://migration.princeton.edu/symposium/program>.

Fina raporto estas nun en preparo fare de postdiplomaj studentoj de Teachers College, Columbia University, kaj de University of Maryland Baltimore County. La raporto espereble haveblos komence de aŭgusto.

Lingvaj tagoj ĉe UN: Esperanto-parolantoj diras sian diron

La naskiĝtago de Shakespeare, 23 aprilo, estas **Anglalingva Tago** en UN. Ĉi-jare, koalicio de naciaj Esperanto-asocioj el landoj kie oni parolas la anglan lingvon, aperigis mesaĝon, kiu memorigis UN, ke, dum “dudek procentoj de la monda loĝantaro uzas la anglan lingvon kiel unuan, duan, aŭ aldonan lingvon” okdek procentoj tion *ne* faras. “Aŭtentike tutmonda komunikado bezonas vastan repertuaron de lingvoj por instigi dialogon, dissemi konon, kaj antaŭenigi daŭripovan evoluigon,” la mesaĝo deklaris. Dume agnoskante la gravecon de la angla, la Esperanto-asocioj de Kanado, Sud-Afriko, Unuiĝinta Reĝlando kaj Usono alvokis al la UN-komunumo, ke ĝi konsideru “la lokon de la angla en la multlingva ekologio de la lingvoj de la mondo.”

Antaŭvidante la okazigon de **Ruslingva Tago** la 6-an de junio, la Rusia Esperantista Unio proponis sian propran mesaĝon: “La rusa lingvo estas la plej vaste parolata slava lingvo kaj la oka plej parolata lingvo en la mondo.... Ĝi estas ankaŭ la dua plej ofte uzata enhavolingvo en Interreto. La rusa lingvo estas unu el la oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj estas vaste uzata kiel helplingvo en internaciaj rilatoj.” Tamen, klarigis REU, “inter la landoj kie la rusa estas oficiala lingvo, ekzistas almenaŭ 200 aliaj lingvoj, multaj neoficialaj kaj endanĝerigataj.”

“Lingvaj rajtoj estas esencaj por ĉiu popolo, sendepende de la grandeco de ties membraro, kaj tiu rajto devas esti protektata ĉefe por malgrandaj grupoj. Pro tio, REU, kaj, pere de ĝi, UEA, invitas ĉiujn konsciiĝi pri la graveco de lingva kaj kultura diverseco.”

Esperanto-renkontiĝoj: Parte virtualaj, parte ĉeestaj

Kiam la antaŭvidata kongresejo estis transprenita por roli kiel vakcina centro, Universala Esperanto-Asocio decidis forlasi planojn por sia ĉeesta monda kongreso, okazonta en Belfasto, Nordirlando, en julio, kaj transiri al virtualo. Jen la dua sinsekva jaro kiam la ĉeesta aranĝo iĝis virtuala. Se la jaro 2020 estas modelo, partopreno en 2021 estos eĉ dekoble pli granda ol oni atendus en ĉeesta aranĝo. La jaro 2021 estis proklamita de Unuiĝintaj Nacioj kiel la Jaro de Paco kaj Konfido – kaj tiu temo fariĝos la ĉefa temo de la kongreso. La datoj: 17-24 julio.

Esperanto-USA renkontiĝos virtuale, en junio (<https://ttt.esperanto-usa.org/eusa/congress/2021/en>) . Aliflanke, Itala Esperanto-Federacio antaŭvidas okazigon de sia normala ĉeesta jarkongreso, de 20 al 27 aŭgusto en Assisi (<https://kongreso.esperanto.it/88/>) pri “Komunikado inter malsamuloj kiel vojo al paco.” Jam aliĝis pli ol 150 personoj.

La aktuala numero (n-ro 43) de la informilo *Esperanto en Afriko* anoncas, ke antaŭurbo de Dakaro, Senegalio, estos la kongresloko por la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto, okazonta de 26 ĝis 30 decembro, 2022.

UEA pri familioj, teknologio, kaj la pandemio

“La pandemio de KOVIM-19 metis familiojn kaj familiajn strukturojn en centran lokon dum periodo kiam en multaj landoj persona fizika kontakto estas malhelpata, la klerigado de infanoj estas interrompita, laborkondiĉoj estas renversitaj, kaj tro multaj familioj suferas pro malsaniĝo aŭ eĉ perdo de familianoj.” Tiel deklaris Universala Esperanto-Asocio en sia mesaĝo memoriganta pri la Internacia Tago de Familioj, la 15-an de majo. “Ni etendas niajn sentojn de solidareco al ĉiuj familioj kiuj perdis familianojn aŭ kies familia vivo suferas pro la nunaj eksterordinaraj cirkonstancoj.”

La mesaĝo aparte atentigis pri la t.n. digita divido kaj ties lingvaj implicoj: “La pandemio montris la gravecon de ciferecaj teknologioj por laboro, edukado kaj komunikado. La pandemio rapidigis teknologiajn ŝanĝojn, ekzemple ampleksan uzadon de enretaj platformoj, nuban komputadon, amasiĝon de datumoj kaj algoritmoj. Tio ebligis grandan flekseblecon rilate al laboro kaj lernado, sed ankaŭ aperigis malbonaĵojn kiel ekrano-lacecon kaj virtualan trompadon.”

Tiun konstataĵon jam spertas la parolantoj de Esperanto, “kiuj vaste uzas komunikan teknologion por kunligiĝi defore, anstataŭigi la normalajn ĉeestajn konferencojn kaj renkontiĝojn, kaj ligi infanojn en diversaj landoj. Per Esperanto, gepatroj povas interŝanĝi informojn, travivaĵojn kaj sciojn pri infana edukado.” Krome, la mesaĝo de UEA aldonis: “Ni rekomendas, ke ni ĉiuj uzu la novajn teknologiojn por pli bone eduki infanojn kaj pli bone familie kunvivi, kaj utiligu la Internacian Lingvon Esperanton por teni solidarecon ne nur ene de familioj sed tra la tuta homa familio, kiu, ne nur pro la pandemio, hodiaŭ sentas eksterordinarajn streĉitecojn. La Internacia Tago de Familioj aparte memorigu nin pri tiuj familioj kiuj suferas pro militoj, pro malsano kaj malsato, kaj pro malfacilaĵoj komuniĝi kun siaj fratinoj kaj fratoj tra la mondo.”

Kultura Diverseco por Dialogo kaj Evoluigo: Esperanto-parolantoj sendas gratulojn kaj kuraĝigon al Unesko kaj UN

“Universala Esperanto-Asocio (UEA) salutas Unuiĝintajn Naciojn kaj Uneskon okaze de la Monda Tago por Kultura Diverseco por Dialogo kaj Evoluigo, la 21-an de majo 2021,” asertas lastatempa deklaro de UEA. “La pandemio de KOVIM-19 forte kaj negative efikis sur la kulturen sektoron: aranĝoj nuligitaj, kulturaj organizoj fermitaj, komunumaj kulturaj praktikoj malebligataj kaj aliaj defioj trafis la loĝantarojn per sociaj, ekonomiaj kaj politikaj damaĝoj ĉie.

“En la Konstitucio de Unesko oni legas, ke ‘[...] reciproka nescio pri la moroj kaj vivoj de aliaj personoj estis ofta kaŭzo, tra la historio de la homaro, de suspekto kaj malfido inter popoloj de la mondo [...]’. Fakte, la plejmulto de la konfliktoj ĉirkaŭ la mondo enhavas kulturen dimension. Pro tio, malferma interkultura dialogo necesas por paco, stabileco kaj evoluigo. La kultura diverseco estas gvida forto por evoluigo, ne nur ekonomia sed ankaŭ socia, intelekta, emocia, morala kaj spirita. Kulturo influas ankaŭ niajn rilatojn kun la natura medio. Pro tio, Unesko jam subskribis multajn konvenciojn, deklarojn kaj rekomendojn por antaŭenigo de kultura diverseco. Kelkaj disponeblas ankaŭ en Esperanto, kiel ekzemple la [Universala Deklaracio de Unesko pri Kultura Diverseco](#).

“UEA gratulas Uneskon pro la iniciatoj disvastigi kaj diskonigi la principojn de kultura diverseco en malfacila kaj defia epoko. Ankaŭ la Esperanto-movado klopodas fari samon per Esperanto en multaj aranĝoj kaj iniciatoj tra la tutmonda reto. Aparte bonvena estas la Internacia Jaro de Paco kaj Konfido, kiu fariĝos temo de la [Dua Virtuala Kongreso de Esperanto](#), de la 17-a ĝis la 24-a de julio. La rezolucio de la Ĝenerala Asembleo de UN pri la [Internacia Jaro de Paco kaj Konfido](#) agnoskas, ‘ke paco kaj konfido necesigas akcepti malkonsentojn kaj kapabli aŭskulti, rekoni, respekti kaj estimi aliajn, kaj ankaŭ vivi paco kaj unuigite’. Gravas tiurilate la scio pri la propra kaj aliaj kulturoj, la malfermiteco kaj la interkomunikado kaj dialogo...

“Lingvo kaj kulturo estas intime interligitaj. Pro tiu kialo, ni invitas ĉiujn uzi Esperanton por internaciaj interŝanĝoj sen nacilingva diskriminacio. Tiel oni helpas la liberan fluon de ideoj pere de vortoj kaj bildoj, kaj starigas spacojn kie ĉiuj kulturoj povu esprimi sin kaj konigi sin. Al la Esperanto-movado gravas la libereco de esprimado, pluralismo en la amasmedioj, multlingvismo, kaj egaleca aliro al arto kaj al scienca kaj teknologia scio...

“Krom la jam notita agado de UEA kaj ties junulara kunlaboranto Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, elstaras la eldonserio [Oriento-Okcidento](#) kun 62 publikigitaj verkoj en Esperanta traduko, la Esperantaj versioj de [Global Voices](#) kun pli ol 570 publikigitaj artikoloj, kaj la Esperanta [Vikipedio](#) kun pli ol 296 000 artikoloj.”

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. www.esperantoporun.org.

